

LA VERDA LUPEO



INFORMILO de ELF/AREK

Aprilo 2019

(51a jaro)

N-ro 180

Esperanto-Ligo Filatelista /Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Redakcia skipo: Elda Doerfler - Via del Ghirlandaio 18/1 IT-34138 Trieste

James Rezende Piton - Rua Aristides Perini, 48 - BR-13141-025 Paulínia-SP



Rudolf Burmeister ne plu estas kun ni!

ELF-AREK salutas sian karan Redaktoron!

“1987—100 Jaroj de Esperanto. Ankaŭ ni en Triesto devas aktiviĝi por celebri tiun gravan daton, sed... kiel? Kion ni faru? Ĉu okazigi publikan prelegon pri la evento? Jes, bona ideo, sed ĝi estas tro mallong-daŭra kaj certe el ĝi nenia spuro restos: ni devas semi pli vaste por ke kelkaj novaj plantetoj ekkresku.

Nu, kial ne starigi ekspozicion kaj per ĝi rakonti la historion de nia Lingvo? Jes, bona ideo! Ni povas elmontradi librojn, vortarojn, gramatikojn, diskojn, poŝtkartojn ricevitaĵojn el la tuta mondo, eĉ poŝtmarkojn ... Sed kie tion prezenti? Post kelkaj esploroj, entuziasme



Ekde la 1^a de Januaro 1977, laŭpete de Ivar Paulsson tiama ELF-AREK-prezidanto, iĝis redaktoro **Rudolf Burmeister**, ekde n-ro 36.

respondis al nia peto la Urba Biblioteko. Spacon oni donis, montrofenestrojn, vitrinojn kaj salonon por prelegi. Kaj ĉion ĉi senpage!

Bone, duona laboro farita, ĉu ne? Nun ni kolektu kiel eble plej da bona materialo, altira kaj alloga kaj bone priskribita, por publiko nenion scianta pri Esperanto.

Sed, klare, aperis sufiĉe serioza problemoj: ĉar intenco estas prezenti la ekspozitaĵojn laŭ difinita temaro, por rimarkigi ke nia lingvo estas aplikebla en ĉia ajn kampo de la homa scio, tiu rilata al filatelo ŝajnis tro malmulta. Kiel eblas solvi rapide ĉi problemon? Jam ne estas tiom da tempo!

Ideo sparkis en mia kapo: mi skribos leteron al ELF-AREK, al la ligo filatelista! La koncerna adreso facile troveblas en la Jarlibro 1986: letero tuj estas sendita al Rudolf Burmeister, en kiu estis klarigitaj niaj bezonoj. Rapide alvenis la respondo (certe pli mallante ol ho-

diaŭ), plena je trafaj konsiloj kaj enhavanta ankaŭ la adreson de s-ro Werner Heimlich, la estro de la StampoBanko, kiu tuj disponigas al ni multajn esperantaĵojn kontraŭ malaltaj prezoj.”

Tiam do okazis mia unua perletera renkontiĝo kun R. Burmeister. La sekvo estas facile divenebla: mi iĝis ano de ELF, multon profitis de la Stampo-Banko de s-ro W. Heimlich, Rudy (*jes, intertempe ni amikiĝis kaj miaj leteroj baldaŭ komenciĝis per tiu karesnomo—Rudy aŭ Ruĉjo*) ofte sendadis al mi interesan materialon, kiun mi klopodis reciproke laŭ mia povo - pri tio mi estas daŭre ŝulda al li! En siaj leteroj li multon rakontis al mi pri Filatelo kaj Esperanto, kio puŝis min pliprofundigi miajn sciojn kaj konojn tiukampajn. Intertempe mi multon lernis, legante la informoplenan “LA VERDA LUPEO”-n, majstre de li redaktitan.

Tiel pasis la jaroj, ĝis kiam... belega surprizo! En majo 2003 Rudy decidis veni al Triesto, kune kun sia edzino Eva-Marie por konatiĝi - finfine! - persone. Kiel belajn tagojn ni ĉiuj kune pasigis! Kaj kiom da diskutoj pri Esperanto-Filatelo! Li estis senfunda puto je sciado, kompetenta pri filatelo ĝenerale kaj E-filatelo specife, gajninto de diplomoj kaj medaloj en naciaj kaj internaciaj ekspozicioj per siaj Esperantaj eksponaĵoj, aktiva en siaurba E-asocio kaj en la landa. Mi estus lin aŭskultinta dum horoj, sed ankaŭ al ŝia tre ĉarma edzino Eva-Marie mi deziris doni la merititan atento. Ni ne nur do “laboris” sed ankaŭ tre amuziĝis kune! La Geburmeister-oj fariĝis ekde tiam niaj plej karaj geamikoj. Nia interkorespondado daŭris interrete, ĉiajn temojn ni tuŝis, pri kiuj — plej ofte — niaj personaj opinioj akordiĝis. Kio plej karakterizis niajn mesaĝojn estis la ambaŭa vigla ŝercemo kiu startigis tutan vicon da kromaj mesaĝoj, dum kiu unu klopodis superi la alian per spritaj vortumadoj kaj lingvoĵongladoj. Ankaŭ ĉio ĉi tre multe mankas nun al mi.



En 2009 mi ricevis donace de li libron, kies titolo estas PHILATELIE UND ESPERANTO, kun subtitolo “Ein Material von Rudolf Burmeister”,

ĝuste en tiu jaro eldonita fare de la fame konata historiisto kaj interlingvisto Detlev Blanke. En la 135-paĝa, A4-formata, laboraĵo oni povas admiri, kolore, mirindajn bildojn de la originalaj pk-oj, glm-oj, stampoj k.a. apartenantaj al Rudolf. La libro estas dividita en 5 ĉapitrojn kiuj pritraktas interalie la Historion de Esperanto-Filatelio;



Unu el pluraj esperantaĵoj
iniciatitaj de RB

Esperanto-Filatelio en GDR; kaj fine estas prezentata lia tuta eksponaĵo “Historio de Esperanto”. Ĉi lasta estas grandioza laboraĵo pro la elekto de la ekzempleroj, pro la maniero prezenti la historion de planlingvoj ĝis atingi la ekston de nia lingvo, pro la granda valoro de tiuj dokumentoj. Plej probable tiu mirindaĵo estis ekspoziciita okaze de la 100-jariĝo de Esperanto, sed mi ne certas.

El tio oni povas dedukti ke en lia kolekto troviĝas valoregaj historiaj poŝtkartoj, poŝtmarkoj, glumarkoj k.a. do, neimagebla trezoro bilde rakontanta la historion de la lingvo kaj de la E-movado, kiun li sukcesis kunmeti dum jaroj kaj jaroj, danke al sia granda amo al Esperanto kaj al Filatelio al kiuj li dediĉis 72 jarojn de sia vivo.

Se li estis eminenta filatelisto, same eminenta li estis kiel homo kaj mi tre fieras ke li honoris min per sia pli ol 32-jara Amikeco.

Multon li mankas kaj mankos al siaj edzino kaj ĉiuj familianoj, al mi, al vi ĉiuj kiuj havis la ŝancon konatiĝi kun li, al nia ELF-AREK kaj LA VERDA LUPEO, kiuj iĝis nun orfoj de tiel granda patro. Nur ni konsideru, ke li pretigis CENT KVARDEK TRI LVL-ojn!

Mia kara Ruĉjo, se vi iel sukcesos, legi ĉi tiujn miajn vortojn, sciu ke la memoro pri vi neniam malaperos el niaj koroj kaj ni—almenaŭ tion ĉi mi firme volas kredi—daŭrigos laŭ niaj povoj kaj scioj kaj ebl-oj la laboron de vi komencitan en la malproksima jaro 1963a, kiam vi, kune kun areto da geamikoj por kiuj Esperanto kaj Filatelio estis parto de ilia vivo, ekfondis ELF-on.

La karan Eva-Marie kaj ĉiujn familianojn sincere ni kondolencas kaj varme ĉirkaŭbrakas ilin ĉiujn!

Kun tre ĉagrenaj sentoj, kune kun ĉiuj anoj de ELF-AREK,
via Elda Doerfler

Estimataj kaj Karaj Ge-Liganoj!

La lastatempa funebra okazaĵo estis granda ŝoko por ni ĉiuj kaj - sincere dirite - mi sentas min antaŭ vojkruciĝo, malkapabla elekti la ĝustan direkton.

Ekde kiam mi iĝis prezidanto, nome en la jaro 2006, okaze de la Florenca UK, la vojo antaŭ mi ŝajnis sufiĉe facile irebla kaj glata, ĉar kune kun mi laboris kiel kasisto - Rolf Beau; kiel LVL-redaktoro - Rudolf Burmeister; kiel grava helpanto de la trio per sia StampoBanko - Werner Heimlich. Sed ne nur tiuj laboris/kunlaboris: estis krome Hermann Heiss, la ekŝiginta prezidanto, kiu ĉiam pretis doni siajn valorajn konsilojn; Richard Hirsch, la kompetentega filatelisto kiu elfaris la valoregan katalogon entenantan ĉiajn Esperanto-Filatelaĵojn, pri kies ĝisdatigo okupiĝis poste nia Burmeister, eldonante de tempo al tempo la suplementojn, kiujn li enirigis en LVL-n; Anna-Greta Strönnne, kompetenta filatelisto kiu plurfoje ekspoziciis en sia urbo; niaj japanaj nelacigeblaj kaj aktiva amikoj, Ziro Suzuoki kaj Haruja Maekawa - ĉi lasta eldonis ekde 2005 multegajn Ipm-ojn okaze de la E-eventoj en lia lando. Kaj ni ne forgesu la francan Esperantiston Jean Amouroux (mortintan januare 2018), kiu eminentis kiel historiisto, esploristo kaj mem kolektanto de Esperantaĵoj: li abunde artikolis por Esperanto-gazetoj kaj kunlaboris kun historiistoj, bibliotekoj kaj muzeoj. Junie 2018, mortis alia tre aktiva esperantisto, malgraŭ sia grandaĝo, Johano Jankowski, kiu faris seriozajn studojn kaj esploradojn pri moneroj kaj medaloj en Esperanto. La vico pli longas kompreneble, sed mia intenco estis nur atentigi vin, ke fakte mi estas la sola ELF-AREK-estrarano kiu restas el tiu aro da personoj kiuj konstante kaj precipe bonkvalite helpadis por la antaŭeniro de niaj Ligo kaj LVL. Kial la sola? ĉar ekde la morto de kasisto Rolf Beau, mi - preskaŭ devige! - surprenis lian taskon, kaj nun..., ĉu ankaŭ la redaktadon de LVL? Kion vi pensas pri tio ĉi? Tute ne povas ekzisti estraro konsistanta nur el UNU persono, tio ĉi estas kontraŭleĝa!

Verdire mi ne havas multajn ideojn por solvi ĉi situacion: mi nur scias ke ELF-AREK troviĝas nun en bona financa situacio, ke de kelke da jaroj ĝi estas pli videbla danke al sia ĉeesto en la UK-oj, dum kiuj ĝi partoprenas en la Movada Foiro kaj organizas publikan kunvenon, ĉ. du-horan en luita salono. La membraro estas sufiĉe akurata en sia kotiza pago, kio kompreneble tre helpas ĝian pluvivadon. Pro tiuj ĉi kialoj mi tute rifuzas ekpensi, ke ĉio, konstruita ekde 1963, malaperu

el Esperantujo: se ni ebligus tion, ni perfidus tiujn, kiuj dediĉis al ĉi Ligo grandan parton de sia vivo, sekve tempon kaj monon, kaj ni perdos asocion kiu havis kaj havas gravan rolon en la konservado de la historia valoro en la fakoj filatela kaj esperantaĵa.

Post tiu ĉi enkonduko, iom nigre pentrita, ekzistas tamen elirvojo: jam leviĝis tri voĉoj kiuj sufloris al mi, ke iuj helpemuloj pretas - laŭ propraj ebloj - kunlabori por antaŭenigi ELF-AREK-on. Ĉiuj tri estas bone konataj: Tutunue James Rezende Piton, ankaŭ li de jaroj kara amiko de Rudolf, kun kiu li kunlaboris per artikoloj filatel-temaj, aktiva esperantisto (iama TEJO-estrarano, UEA-komitatano por Brazilo...), kultura aganto ĉefe rilate al E-filatelito, gajninto de premioj dum brazilaj, portugalaj kaj internaciaj ekspozicioj ka) promesis sian konstantan subtenon. Sekvas Albert Boon, la iniciatinto de la Esperanto-Numismatika Asocio, kiu lerte kaj majstre redaktas la ret-gazeton **ESPERANTA NUMISMATIKO**. Fine, Michel Basso, tre aktiva samideano, estro de konstrua entrepreno en Francio, kaj fondinto de **TAKE-ESPERANTO** (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj).

Tiel ĝis nun! Kaj nun mi atendas viajn komentojn, sugestojn, kritikojn - ĉion ajn mi volonte akceptas. Sufiĉas, ke la fina celo estu daŭra apogo al ELF-AREK, por ke ĝi ĉiam pli kaj pli prosperu kaj disvolv-iĝu por la bono de Esperanto en la filatela kaj numismatika kampoj.

Filatelajn salutojn de via prezidanto

Edele Dooylaer

  ELF - AREK Praha 2011	 ELF - AREK Esperanto sekce ČNS Svazu českých filatelistů  Esperanto sekce de CZ filatela asocio komune 80 PRAHA 9. - 12. 9. 2011  	Maŝinstampo, iniciatita de Vladislav Hasala el Strážnice, memore de ELF-AREK- renkontiĝo, okaze de la Internacia Kolektanta Foiro Sbĕratel en Prago.
---	--	--

Dum mi navigadas en la retejo de la Internacia Esperanto-Muzeo, Vieno, altiras mian atenton la UEA-revuo *ESPERANTO*, 15/31 oktobro 1938, en kies indekso aperas “Nekrologo por Achille Tellini”. Jen grava itala E-pioniro, kiun eble malmultaj hodiaŭ bone memoras, aŭ eĉ pli malbone, scias nenion ajn pri li. Indas foje malantaŭen rigardi al la intaj tempoj kaj rememori tiujn homojn kiuj preparis al ni ne tro krutan vojon al disvastigo de Esperanto.

En tiu revuo aperas nekrologo skribita de s-ro Johano Della Savia, el Udine, esperantisto tre agema kaj kunlaboranto de A. Tellini. Li interalie eldonis E-glumarkojn kaj aliajn esperantaĵojn.



Achille Tellini ankaŭ presigis esperantaĵojn, precipe poŝtkartojn kaj Eks-librisojn, kiujn ambaŭ li mem foje arte desegnis. Sed nun ni legu lian vivkronikon el la plumo de Johano Della Savia.

“Sekve de kormalsano, kiu lin trafis antaŭ kelkaj jaroj, la 1^{an} de Oktobro 1938, je la 5^a horo ptm, subite mortis en Udine Profesoro D-ro Aĥilo Tellini.

Li naskiĝis en Udine (Friulo) la 25^{an} de Februaro 1866. Apenaŭ 22-jara li doktoriĝis je natursciencoj ĉe la Universitato de Torino, kaj tuj fariĝis asistanto, je geologi-katedro, ĉe la Universitato en Romo.

Poste li instruis ĉe la Reĝa Teknika Instituto en Udine. Pro sia scienca vast-ampleksa aktiveco, kaj pro rekono de siaj meritoj D-ro Tellini ricevis de la Roma’a urbeŝtraro, grandan ormedalon. En 1900 li estis esploristo en Afriko (Eritreo) kie li plenumis gravajn studojn pri rivero kaj bestaroj tieaj: la riĉan materialon tie kolektitan li malavare donacis al la Natur-Historia Muzeo en Trieste. Sian riĉenhavan sciencan libraron li donacis al Sankta-Marino-Republiko: sekve de tio, oni lin enskribis inter la respublikaj “honoraj civitanoj”.


Pro la alta scienca valoro de siaj verkoj li fariĝis honora membro de Ateneo en Brescia kaj de l’Akademio Scienca, Beletristika kaj Belarta de Venecio.

Eks-libriso de li mem desegnita



De pluraj jaroj li sin dediĉis al lingvo-scienco kaj eĉ famaj lingvistoj turnis sin al li por konsiloj je la deĉifro de antikvaj dokumentoj (ndr:

La Associazione universale dei medici esperantisti, U.E.M.A., conta oltre 300 soci in tutte le parti del mondo. Associazione, fondata l'11 gennaio per il 1909 (il soci ad un numero di cinque dell'organo mensile "Voce di Kuracista") (Grafico), al Sig. H. F. Adolf Thalwitzer e Hilschkeleski - Brada.



L. L. Thalwitzer

Unu el la multaj propagandaj poŝtkartoj, eldonita de Achille Tellini, komence de 1900.

Supre de la poŝtkarto, itallingve: *Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio T.E.K.A. nombras pli ol 500 anojn en ĉiuj mondaj partoj. Membroj.*

Petu la Jarlibron por 1909 (1 libro) kaj senpagan ekzempleron de la monata organo "Voĉo de Kuracisto" al S-ro H. F. Adolf Thalwitzer...

li havis oftan korespondadon kun Jozefo Peano, fama matematikisto, kreinto de "Latino sine flexione", pli malfrue nomita "Interlingua". Lia aktiveco kaj agado tiurilate estis fame konata en Italujo kaj en eksterlando.

Ĝisfunde li konis la romanĉajn (ladinajn) lingvojn kaj sin speciale dediĉis al la friula. Profundan amon li havis al sia malgranda patrujo, Friul-lando, kaj al ĝiaj eminentuloj.

Batalema spirito, verva inteligenteco, ampleksa kulturo, originaleco en siaj vidpunktoj, nekutima modesteco, malofta boneco: jen la ĉefaj trajtoj de tiu ĉi friulano, kiuj forpasis lasinte al studemuloj ampleksan verkaron rilatan al naturo, hidrologio, geologio, geografio, protektado de medio ktp.

Rimarkindajn plankartojn (mapojn) li publikigis pere de la itala Milita Geografia Instituto kaj sin dediĉis ankaŭ al mineralogiaj serĉadoj. Pri Friulio multon li verkis en gazetoj kaj revuoj ĉefe esperantaj, en-kaj ekster-lande.

Nekalkuleblaj estas liaj propagandparoladoj, faritaj antaŭ la mondmilito kaj multajn rapidajn esperanto-kursojn li okazigis diversloke.

Italan Katedron de Esperanto (nun, Itala Esperanto-Instituto) li fondis dum 1912. Dum multaj jaroj li estis Ano de la Lingva Komitato, Korespondanto de la Akademio por ladina lingvo, Komitatano kaj Delegito de UEA. Dum la mondmilito (kiam Italujo estis ankoraŭ neŭtrala) li sukcese peradis korespondaĵojn inter la internigitaj militkaptitoj kaj iliaj familioj.

Pri lia esperanta verkaro, originala kaj tradukita, mi citas, ne kronologie, nur kelkajn, (neparolante pri la plurcentoj da gazetartikoloj en



itala kaj en esperanta lingvoj dissemitaj tra la tuta esperantujo): Radikaro esfriula-ladina; Esperanta Abelo (gazeto de li mem kompostita per propra preseĵeto - Udine 1907-1912); Gvid-libro de l' urbo Ravenna; La idilio ĉe la fonto; Historio de ex-libris'oj; Plena vortaro esitala; Es-peranta gramatiko en Friula lingvo ktp ktp. En manuskripto ekzistas kolekto de pli ol 1500 popolkantoj de italaj slovenoj (parte de li mem kolektitaj surloke) kun interlinia traduko en Esperanto. Krom al diversaj naciaj, li partoprenis ankaŭ en kelkaj internaciaj kongresoj (Barcelono...)

Pro sia granda amo al Esperanto li konstruigis grandan mozaikan memor-monumenton honore al D-ro Zamenhof.

Tiu ĉi monumento estas starigita en doma korteto, ĉe lia privata loĝejo en Udine (*ndr: nuntempe ĝi situas sur kastela remparo en Udine*).

La malapero de tiu laborema kaj bonkora viro estas gravega perdo por la scienco kaj por la esperantista movado.”

Johano Della Savia, Udine

Fontoj: Enciklopedio de Esperanto, Vikipedio, Esperanto-UEA, el la libro “Il movimento esperantista in Friuli” (Esperanto-movado en Friulo) de G. Martinez



Tiu ĉi insigno estis desegnita de Aĥilo Tellini.

La realigo estis de E. Hericour—Paris.

Supre legeblas: BENVENUTO AL CIUJ (tiel!), Ĝi estis farita por la Klubo de Kolektantoj CONCORDIA, fondita en Parizo, en 1903, Societo pri internaciaj studoj kaj korespondado.

FILATELA FOLIO PRI LA OLIMPAJ LUDOJ EN AMSTERDAMO 1928

Okaze de la someraj Olimpaj Ludoj en 1928, la nederlanda Societo Esperantista LA ESTONTO ESTAS NIA en kunlaboro kun UEA eldonis specialan folion kun la moto *“Esperanto estas la ligstrekejo inter la popoloj”* en ses lingvoj: la nederlanda, la franca, la angla, la germana, la hispana kaj la esperanta. En la titolo Amsterdam estas skribata en la nederlanda, Olimpaj Ludoj en Esperanto.

Sur la folio troviĝas ok nederlandaj oficialaj poŝtmarkoj kun diversaj bildoj (olimpaj sportoj), koloroj kaj valoroj (1 ct = la centa parto de unu guldeno):

remi: malhelverda, 1 ½ centojn

skermi: lila, 2 ct (la nura poŝtmarko kun la simbolo de la valoro!)

futbali: verda, 3 centojn

veli: malhelblua, 5 centojn

puŝlanĉi ferglobon: oranĝa, 7 ½ centojn

kuri: karminruĝa, 10 centojn

hurdokuradi (por ĉevaloj): blua, 15 centojn

Por stampi la poŝtmarkojn sur leteroj kaj kartoĵoj tri specialaj stampoj estis uzataj. Speciala estis ankaŭ la duobla pentograma formo. En la rando troviĝas nederlandlingva frazo:

NEGENDE OLYMPIADE AMSTERDAM STADION MCMXXVIII (naŭa olimpiado Amsterdamo stadiono 1928). La unua olimpiado de la modernaj Olimpaj Ludoj okazis en la jaro 1896 en Ateno. En la pintoj de la (esperanta?) stelo troviĝas la indikoj D (dato), M (monato), 1928 (la cifero 1 estas videbla tra la cifero 9), U (horo) kaj N (stampa numero). La indikoj por la tago, la monato kaj la horo estis apartaj kaj devis esti ŝanĝataj tagon post tago.

1



2



3



La stampoj N1 kaj N2 estis uzataj en la portempa poŝtoficejo, apud la olimpa stadiono.

La stampon N3 filatelistoj povis peti, ke ĝi estu stampata sur afrankaj markoj kaj poŝtmarkoj, sed ne uzita sur poŝtaĵoj (tamen ja sur la esperantaj folioj!). Tio okazis nur en la prefektejo Amsterdamo-Suda kaj la nura celo estis instigi la kolektantojn aĉeti plejeble multajn olimpajn poŝtmarkojn. Ne nur tri diversaj stampoj haveblaj en du lokoj en Amsterdamo, krom nigraj kaj violaj stampoj kaj ... du diversaj uzoperiodoj:

- a. de jaŭdo, la 17a de majo 1928 ĝis merkredo la 13a de junio 1928
- b. de sabato, la 28a de julio 1928 ĝis dimanĉo la 12a de aŭgusto 1928.

Tipo 1



Folio kun stelo

Mezuroj de la Folioj

218x 284 mm

Mezuroj de la Poŝtmarkoj

27x 22 mm

Tipo 2



Folio sen supra stelo

Nevalidaĵo




Sen stampoj pro erara fiksado de kelkaj poŝtmarkoj

Verkis Bert Boon

La folioj enestas lian kolekton.

lama Esperantaĵo plu staras 100 jarojn poste - sen Esperanto

Detektivi menciojn pri Esperanto en detaloj de filatelaĵoj aŭ poŝtkartoj povas esti agrabla ludo. Antaŭ kelkaj jaroj mi malkovris la suban turisman bildkarton el la 1910-aj/20-aj kun foto de ZEO (Zamenhof-Esperanto Objekto), restoracio “À l’Espéranto” en Orphin, Francio, 70 km sude de Parizo. La urbeto tiam kalkulis je 500 loĝantoj (kaj nuntempe ĉ. 850). En tiu ĉi okazo la titolo de la bildkarto helpis.



Antaŭnelonge, mi hazarde trovis fotopoŝtkarton laŭ alia angulo de la sama konstruaĵo! Per ĝi oni konstatas, ke la domo estis izolita, en kampoj.





Sur tiu dua karto eblas pli klare vidi la fasadan skribaĵon kaj distingi la francan vorton por “restoracio” kun “H. Cadot”, kiu estis la nomo de la posedanto.

Tiam venis la penso: kio okazis al tiu domo? Ĉu ĝi plu ekzistas kaj havas spurojn pri “Esperanto”? Ĉu ĝi estas draste transformita ĉar devis cedi lokon al modernaĵo?

Mi provis trovi la domon per mapoj de Google, uzante la rimedon de surstrataj fotoĵoj, laŭ kiuj oni povas “veturi”. Konsiderante la tia-




man izolitecon, mi provis ĉe la ŝoseoj kaj jen mi ĝin trovis en la okcidenta enirejo de la urbeto, ĉe <https://goo.gl/maps/LGSdStpsTY82>.

Laŭ ĉiuj detaloj temas pri la sama konstruaĵo. La fasado estis kovrita per cemento, same kiel la maldekstra flanko sur kiu antaŭe ankaŭ malgrande legiĝis “H. Cadot”.



El alia angulo, videbla ĉe: <https://goo.gl/maps/JdtFqEfDEhk>
 Nun ĝi havas kradojn ĉirkaŭ limigita ĝardeno, kun almenaŭ unu resta-
 anta, el la tri iamaj arbetoj. Kaj nun ĝi havas najbarajn domojn.
 Jen rezultoj de cifereca esplorado. Pri la rilatoj de tiu Cadot al Esper-
 anto ne troveblas spuroj kaj informoj estas bonvenaj.

★ Informas kaj enketis por ni, James Rezende Piton ★



Propaganda karto eldonita de “Nederlanda Katoliko”, gazeto, redaktita en nederlanda kaj esperanta lingvoj, organo de la Nederlanda sekcio de IKUE.

La fino de Neŭtrala Moresneto filatele memorigita

La Belga Poŝto faris belan surprizon al ni la lastan 28-an de Januaro. Tiam publikiĝis oficiala bloko kun du poŝtmarkoj, kiu ne nur iel rilatas al Esperanto sed surhavas esperantajn vortojn: “Neŭtra” Moresneto. Trovis tiun novaĵon nia klubamiko J. R. Piton.

DRESNET - NEŬTRA MORESNETO

La titolo de la bloko aperas en la kvar lingvoj, kiuj ligiĝas al la historio de tiu mallongdaŭra “mikroŝtato” Moresneto (je nur iom pli ol tri kvadrataj kilometroj): la franca, la nederlanda, la germana kaj Esperanto.



La Verda Lupeo jam prezentis kolektaĵojn, ĉefe poŝtkartojn, kiuj atestas ligojn de tiu loko al Esperanto.

Komence de 1908 oni anoncis, ke la regiono fariĝos Esperantoŝtato sub la nomo “Amikejo”. Wilhelm Molly, loka kuracisto, esperantisto kaj framasono, proklamis la plenan sendependiĝon de Moresneto en

la monato Aŭgusto. Inspirita de Gustave Roy, same esperantisto kaj framasono, Esperanto estis deklarita unu el la oficialaj lingvoj. La mikroskopa ŝtatesto daŭris nur kelkajn tagojn, ĉar Belgio kaj Prusio volis plu teni sajn rajtojn.



Antaŭ cent jaroj, kun la fino de la Unua Mondmilito, la regado de malgranda pridisputata terstrio (kaj sendependa de 1816!) estis aljuĝita al Belgio en la Traktato de Versajlo. Inter 1830 kaj 1919, renkontiĝis je unu punkto kvar landlimoj - Belgio, Nederlando, Germanio kaj Neŭtrala Moresneto. La limoŝtonoj montriĝas sur unu el la poŝtmarkoj. La alia prezentas mapon de la regiono kun foto de la zinkominejo, la ĉefa ekonomia povo de la landeto.

Kun poŝtmarkoj kapablaj afranki iom pezajn leterojn, ĝis 100 gramoj, la folio vendiĝas de la Belga Poŝto kontraŭ eŭroj 9,72. Ĝia eldonkvanto estas je 62 225 folioj. La folio ampleksas 189mm x 136mm kaj ĉiu poŝtmarko estas 40mm x 40mm.

Se vi volas rete akiri ekzempleron de la bloko aŭ de la unuataga folio kun la respektiva memorstampo, tion eblas fari ĉe la franca/nederlanda retejo de la Belga Poŝto: <https://eshop.bpost.be/fr/products/moresnet-neutre>





Jam aĉetebblas ĉe UEA la glumarko pri la 104-a UK en Lahtio, Finnlando. Sed ĝia aspekto estas iom enigma. Mi vere ne sukcesis kompreni la signifon de la bildo. Oni povus pensi pri ondoj, maraj ondoj, sed... Nu, la verda stelo ja aperas, informoj pri la UK aperas, - kiam, kie kaj kio-, sed la grafik-aĵo ... verdire iom mistera. Kompreneble finnoj havas la rajton elekti kiun ajn emblemon ili ŝatas, preferas aŭ oni povus supozi ke la elektita desegnaĵo respondas al speciala

signo por finnoj, pri kiu ni nenion scias...

Fakte en ĉiu UK-glumarko aperas ia emblemo, ia karakterizaĵo de la gastiganta lando, en kiu, ĝenerale dirite, la lokanoj identiĝas. Pro tio mi provis serĉi en la kongresa finna tt-ejo klarigajn respondojn kaj fine mi trovis la solvon de tiu enigmo.

Tre longa estas la eksplikado, pro tio mi invitas vin legi ĉe la jena ligilo <http://www.esperanto.fi/uk2019/> la tutan tekston, amplekse verkita de Börje Eriksson, dum ĉi tie mi prezentas etan resumon.

La naskiĝo de nia Lahtia emblemo estis longa procezo. [...] Ĉi tiu artikolo ne estas fina klarigo de ĉiuj simbolaj elementoj en la emblemo, lasu ni al la kongresanoj mem, ke la spertoj de la kongresa semajno inspiru pliajn imagojn.

En la relative malgranda urbo Lahtio ne estas tre multaj videblaj landmarkoj, tamen almenaŭ du vere bone videblaj: la tri famaj skisaltejoj kaj la du radiomastoj [...]. Krome unu, kantele/kantelo, la finna nacia kordinstrumento, ludas gravan rolon, ne nur en la emblemo [...] Inter la kordoj videblas du flamoj, finne liekki. En la dua nacia lingvo de Finnlando, la sveda, oni parolas pri eldtungor, 'fajrolangoj', kio alproksimigas al lingvoj. Ĉi tiuj du videblaj flamoj estas parto de vico komenciĝanta per la indiĝenaj lingvoj, kiel la sameaj, kaj daŭriganta per la lingvoj de novaj enmigrintoj. Tiel la multlingveco de la mondo ankaŭ videblas kaj la verda signo de l' espero brile sin prezentas en ĉi tiu sfero. Tio samtempe donas al la emblemo universalan aspekton. [...]

Eble tro konciza estas mia klarigo, ĉar prezentitaj estas nur la ĉefaj elementoj. Unuafoje en bildo de E-glumarko mi trovis tiom da simboloj, por kies klarigo estis bezonata longa artikolo. La emblemo estas envere signifoplena, tial gratulindas la elpensintoj!

ED.

Mark HAMME
#33391-379
United States Penitentiary Tucson
P.O. Box 24550
TUCSON, AZ 85734
UNITED STATES



Usona esperantisto, kiu ĉijare fariĝis membro de nia Ligo, deziras korespondadi kun aliaj esperantistoj-filatelistoj. Bedaŭrinde li ne rajtas uzi komputilon, sed nur manskribilon. Ĝenerale liaj leteroj bezonas preskaŭ 3-4 monatojn por atingi la adresaton, tamen certe li respondos al viaj leteroj. Li mem interesiĝas ankaŭ pri poezio kaj ŝatas skribi kelkajn versaĵojn. Alia malpermeso: ekde kelkaj monatoj li ne plu rajtas ricevi novajn aŭ malnovajn poŝtmarkojn pro nova regulo de la direktoraro. Li estos tre kontenta konatiĝi kun aliaj esperantistoj/filatelistoj kaj interŝanĝi tiutemajn ideojn.

David G. VALECILLOS V.
Calle 79 N° 3 C – 72
Pquia. Sta. Lucia–Mcpio. Maracaibo
MARACAIBO-4002 (ZULIA)
VENEZUELA

David Valecillos eklernis Esperanton en 1964, aŭtodidakte. Li ne havas multajn kontaktojn kun alilandaj esperantistoj, tial li tre ŝatus ek-korespondi kun vi, precipe kun filatelo-ŝatantoj. La situacio nuntempe en Venezuelo estas tre malfacila, tial tre helpos lin trovi amikon kiu havas liajn samajn interesojn: Esperanto kaj Filatelo. Li ne posedas komputilon kaj ne havas la eblon interretumi. Ankaŭ li estas membro de ELF-AREK. Ĉu iu havas iom da tempo por dediĉi al li?

	Tutaĵo eldonita la 15an de julio 1927, okaze de la 19a UK en Danzig. Nominalo: 10 pfenigoj Formato de pk: 147x105 mm Ruĝkolora bildo de la danziga havena eniro. Oficiala UK-stampo. Tekstoj en germana, franca kaj esperanta lingvoj. <i>El la kolekto de G. Martinez</i>
--	---

